77

„Mutig vorwärts!"

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen"

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

11a jaro. N-ro 11 — Monata — Novembro 1934

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Das **Eisenbahnministerium in Prag** hat einen sehr schönen, elegant ausgestatteten Esperantoführer durch die Tatra herausgegeben. Derselbe umfaßt 24 Seiten mit vielen schönen auch kolorierten Bildern und zwei Landkarten.

Die **Niederländische Postdirektion** hat mit Erlass vom 16. Mai bestimmt, dass Postangestellte, die am Esperanto-Weltkongress in Stockholm teilnehmen wollen, hiefür besonderen Urlaub erhalten.

Esperanto in englischen Schulen. Teils als Pflicht, teils als Wahlgegenstand wird Esperanto an 27 englischen Schulen unterrichtet (1006 Schüler).

Wissenschaft und Esperanto.

Soeben erschien der „Bericht der Luftbeobachtungsstation in Tateno, Japan", Nr. 9, ebenso wie die vorhergegangenen 8 Bände in Esperanto, im Verlage dieses wissenschaftlichen Institutes. Der Band ist in Großformat 214 Seiten stark.

Die **Geografische Gesellschaft** von **Rio de Janeiro**, Brasilien, hat in ihrem 38. Band (2. Semester 1933) **am Schlusse aller Artikel** stets eine Zusammenfassung in Esperanto gegeben und auch einen einen eigenen Artikel in Esperanto über „Esperanto bei der Post" nebst Abbildungen der in Brasilien herausgegebenen offiziellen Esperanto-Bildpostkarten mit Esperantotext veröffentlicht.

Radiovorträge:

21. November: **Franz Vasta** „Der österr. Postkraftwagenverkehr" (z. Verf. g. d. Gen.-Dir. f. Post- u. Telegrafenwesen) 22 h 20.

28. November: Reg.-Rat **Steiner** „Der 27. Esperanto-Weltkongreß in Rom und die Vorveranstaltungen in Innsbruck und Klagenfurt" (in Deutsch und Esperanto).

5. Dezember: **Nikolaus Hovorka** „Das Erwachen des österreichischen Gedankens in der Literatur".

12. Dezember: Int. Liederabend nebst Ansprache über „Werk u. Wirken Zamenhofs" zum 75. Geburtstag. Es singt Prof. Tausche.

19. Dezember: Rechn.-Rat **Ludwig Siedl** „Wiener Weihnachtbräuche".

Veranstaltungen.

Café Siller, „Goldener Saal",
I. Schwedenplatz.

Donnerstag, 22. November, 19 h 30:
Lichtbildervortrag Regierungsrat Steiner über **„Lettland"** in deutscher Sprache und Esperanto.

Mittwoch, 12. Dezember, 20 h:
Gedenkfeier aller Wiener Esperantovereine zum 75. Geburtstage Zamenhofs.
Eigenes gediegenes Programm und Uebertragung mit Lautsprecher der Gedenkfeier aus Radio-Wien mit folgendem Inhalte:

Internationaler Liederabend.

„Es tagt" (Tagiĝas) Musik von Baranski, Text: A. Grabowski, Orig. Esperanto (Polnisch).

„Ueber Werk und Wirken Zamenhofs" Präsident Reg.-Rat Steiner in Deutsch und Esperanto.

„Ich versuche" (I attempt), Musik: Henry Purcell (Englisch).

„Berceuse" Musik: Gounod, Text: Victor Hugo (Französisch).

„Der Nebel" (Nebbia) Musik: Respighi, Text: Ada Negri (Italienisch).

„Sommermorgen" Musik: Lindblad, Text: Dohrn (Schwedisch).

„Zwei Sperlinge" (Két veréb) Musik: Huszka Jenő, Text: Beöthy L. (Ungarisch).

„Mädchen, mein Mädchen" Musik: Lehár (aus der Operette Friederike).

„Esperantohymne" Musik: Menil (Esperanto).

Die Lieder singt Prof. **Tausche.**

Vor den Liedern, die in Esperanto gesungen werden, erklärender Text in deutscher Sprache durch Präsident Steiner.

Bei beiden Veranstaltungen Eintritt frei! Gäste mitbringen! Pünktliches Erscheinen erbeten!

Al Roma, al Roma . . .

27. Univ. Kongreso de Esperanto, 11-a Somera Universitato, Kongresa Krozado.

3.—10.—17. de aŭgusto 1935.

Patronado: Jam akceptis eniri la Patronadan Komitaton la potenca Asocio »Touring Club Italiana«.

Loka Kongresa Komitato (LKK):

Prez.: Generalo Markizo Carlo Cordero di Montezemolo, prez. de IEF.

Vicprez.: d-ro prof. Giorgio Canuto, vicprez. de IEF.

Membroj: Geom. F. Bodini, Libt. A. Clavenna, Prof. G. Facchi, Libt. E. Filippi, Prof. F. Fresco, Prof. G. Grazzini, Prof. St. La Colla, D-ro Prof. B. Migliorini, D-ro E. Migliorini, L. Minnaja, D-ro Prof. V. Musella, D-ro Inĝ. R. Orengo.

Adreso: Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.

Poŝ ĉ kokonto: Esperanto-Centro Itala, Milano N. 3. 18715.

Kotizoj: Baza kotizo Liroj 100.—. Rabato ĝis 30% por frualiĝintoj. Favorkotizoj por familianoj kaj junuloj.

Rajtoj de la kongresanoj: Ili rajtas partopreni la kunsidojn kaj prelegojn, la oficialajn akceptojn, festojn kaj similajn aranĝojn. Li ricevos tre grandajn rabatojn partoprenante la turisman vojaĝon »Tra Italio« kaj la »Kongresan Krozadon«. Sed tiuj grandaj rabatoj nur validas por aliĝoj ĝis fino de januaro 1935! Li krome ricevos la oficialajn raportojn de UEA kaj de aliaj oficialaj institucioj, urboplanojn kaj gvidlibretojn de LKK, por plene ĝui la vojaĝon tra Italio.

Lotumado: Inter la aliĝintoj ĝis la fino de januaro estos lotumataj allogaj premioj, turisma vojaĝo kaj libropremioj.

Ĉefaj datoj de la kongreso:

Firenze 3. aŭg. malfermo de Somera Universitato.

Roma 5. aŭg. Solena Malfermo, 7. aŭg. ĉefaj kaj fakaj kunsidoj, Internacia balo.

Napoli 9. aŭg. granda kongresa ekskurso, 10. aŭg. fermo de la kongreso, komenco de la Kongresa Krozado al Afriko.

Genova 17. aŭg. fino de la Kongresa Krozado. Fermo de la Somera Universitato.

Do la unua semajno (Firenze-Roma-Napoli) enhavos la ĉefajn kongreslaborojn kaj la dua de la 9.—17. aŭg. la plej interesajn prelegojn de Somera Universitato (sur la ŝipo de Kongresa Krozado) kaj la plej interesajn partojn de la granda turisma vojaĝo al Italio ĝis la malproksimega Sudo, ĝis la blanka Afriko.

Kongresa Krozado: Ripoza vojaĝo per granda ŝipo sub Esperanto-flago en la blua Mediteranea Maro de Napoli al Siracusa (Sicilio), insulo Malta, Tripolis en Afriko, Palermo (Sicilio), insulo Elba, Genova — Ne nur simpla, postkongresa ekskurso, sed parto de la kongreso mem kaj ĉefa sidejo de Somera Universitato estos tiu ĉi Krozado, kiu tuŝos la junan italan kolonion en Afriko, ravan pejzaĝon araban, la randojn de la granda dezerto mem. Impona, alloga, unika pagandvojaĝo!

Aliĝis: Jam 70 el 14 landoj.

El **Aŭstrio** estos aranĝata karavano al Firenze kaj de tie pere de IEF-servo al kongreso. **Aliĝojn al Int. Esp.-Muzeo,** donos kontraŭ respondafranko ĉiujn necesajn informojn!

Antaŭkongresoj: Innsbruck kaj Klagenfurt. Detaloj sekvos!

Atentu la Radio-paroladon la 28. de ... pri la Kongreso kaj Antaŭkongresoj!

Kion ĉiu kongresonto devas scii el la itala lingvo.

Birra (chiara, scura; piccolo, medio, grande). — Biero (hela, bruna; malgranda, mezgranda aŭ granda glaso da biero). La granda glaso estas proporcie pli malmultekosta. Konsekvence, trinki pogrande signifas ŝpari.

Botte. — Vorto kun duobla senco, ĉar laŭ la sono de la litero o — ĝi signifas barelon aŭ homfrapadon.

Se vi persone petos pri barelo, akcentu tre korekte la oon.

Campari (bitter, cordial). — La rubekolora kaj iom maldolĉa „Bitter Campari" estas la plej konata itala aperitivo; la „Cordial Campari" estas dolĉe parfumita likvoro kiu helpas digeston. (Pro ĉi tiu duobla tutmonda reklamo ni jam ricevis rekompence botelaron, sed jam lastan merkredon ni postrestis plu unu guto.)

Castelli (delli). — Speciala rimedo por sendi elegante la amikojn sub la tablon, estas ilin afable inviti por gustumi la helajn diverskolorajn vinojn, kiuj estas ĝenerale konataj laŭ la kolektiva nomo „Vino de la Kasteloj" (de la Roma montareta ĉirkaŭaĵo).

Cerini (elp, ĉerini). — Vaksalumetoj. Por ili nespertuloj ofte kapablas ekbruligi siajn fingropintojn. Tamen estas konsilinde havi ĉiam skatoleton da tiaj alumetoj, ĉar — se eventuale tria ulo ĝenas, dum oni afable interŝanĝas ideojn kun aliseksa persono por solvota demando — estas rekomendinde donaci al la tria ulo kelkajn vaksalumetojn por ke li povu lumigi sian elirvojon.

Chianti (elp. kianti). Mirinda regiono, kiu kapablas produkti preskaŭ dek milionojn da kilogramoj da vinberoj, el kiuj oni postsukcesas elpremi preskaŭ unu miliardon da hektolitroj de la samnoma fama vino!

Donna che muove l'anca. — Virino, kiu movas la kokson. — Per tiu ĉi esprimo oni karakterizas sinjorinon, kiu — por nedefinita celo — kokete promenas laŭ maniero de kortaj naĝbirdoj.

Due piazze. — Signifas „du placoj" — sed tiel ankaŭ oni nomas liton sufiĉe vastan por ke du personoj povu, eĉ dum somero, kundormi neĝenate kaj senŝvite.

(El „Pirato-Paris") Daŭrigota

Esperantista Lingva Komitato (Akademio).

Generalo Bastien rezignis pro sia elekto kiel prezidanto de UEA pri la ofico de direktoro de la sekcio „Komuna Vortaro". S-ro W. Bailey estas elektita de la Akademio por anstataŭi lin.

Akademio elektis korespondantino f-inon Lidja Zamenhof, kaj korespondantoj inĝ. d-ron Orengo, direktoron de la sekcio „Teknikaj Vortaroj" kaj s-ron R. Kreuz, direktoron de UEA.

La jarlibro de Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio por 1934 kostas 2 fr. fr.

La prez.: M. Rollet de l'Isle

Kvina oficiala aldono al Universala Vortaro.

(Radikoj akceptitaj de Lingva Komitato.)

1. Oficialaj vortradikoj, aldonitaj al Universala Vortaro:

Balteno: Perioda informilo de societo — periodischer schriftlicher Bericht.

Fono: Efektive ebena aŭ pro malproksimeco ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas aŭ elkontrastas — Hintergrund.

Kabineto: 1. Ĉambro destinita al intelekta laboro — Arbeitszimmer: 2. Speciala ĉambro, kie oni ekspozicias sciencajn aŭ artajn kolektojn — Sammlnngszimmer; 3. Ministraro — Regierung.

Plagiato: Nelojala faro de tiu, kiu prezentas sub sia propra nomo verkon aŭ parton de verko, kies aŭtoro li ne estas — geistiger Diebstahl.

Slipo: Kartona aŭ papera folieto, facile ordigebla, sur kiun oni skribas iun noton — (Kartei)-Zettel.

2. Teknikaj vortradikoj, enkondukitaj en Komunan Vortaron:

Aviado (Aera navigacio): Arto aerveturadi per aparatoj pli pezaj ol aero — Fliegerei, Flugwesen.

Bremso (Mekaniko): Mekanika aŭ elektra aparato por malakceli, haltigi aŭ reguligi movon aŭ funkciadon de maŝino — Bremse.

Pilo (Fiziko): Fonto de elektra energio, uzanta la transformiĝon de kemia energio — galvanische Säule.

La direktoro de la Sekcio „Komuna Vortaro": L. Bastien.

La Prezidanto: M. Rollet de l'Isle.

Marista Ligo Esperantisto.

Dum la kongreso en Stockholm fondiĝis ĉi tiu Ligo. Jam maristoj-esp. el diversaj landoj aliĝis kaj kunlaboras en la renovigo de „Teknika Provo de Marista Terminaro". Estas serĉataj ankaŭ anoj de la iama Aŭstria-hungara ŝiparo. Ili anoncu sin al s-ano Guesdon, Villers St. Sépulcre (Oise), Franc.

Honorigo.

S-ano Jean Couteaux, direktoro de Hospitalo Cochin-Paris, ricevis de la Ŝtatprezidanto de Francujo la Kavalirecon de Honora Legio. Plezure kaj tutkore ni gratulas.

AEA: Steiner

Honorigo.

Nia s-ano eksprofesoro de Teknika Altlernejo en Wien kortega konsilisto d-ro, d-ro inĝ. (h. c.) Richard Schuman, kiun ni dankas la fondon de la Lektorato en Teknika Altlernejo, ricevis de la Ŝtatprezidanto de Aŭstrio la

Oran Honorinsignon.

Ni elkore gratulas! IEMW, AEA, AE

Bali'

Fabela insulo kun tre artisma popolo.

Religio kaj Kulturo.

Ke en ĉi-tiu tempo ekzistas ankoraŭ terpeco, kie la enloĝantoj — belaj, afablaj, artistaj — vivas senzorge, ne tuŝitaj de la malfacilaĵoj de implikita ekstermondo, estas io, kion Okcidentano nur povas kredi post vizito de Bali'.—

Pri ĉi-tiu insulo oni tiel multe rakontis, ke vizitonto rajtas tre streĉi ŝiajn atendojn. Eĉ tiam li ne seniluziiĝos. Kiel oni asertas pri Napoli, ke kiu vidis Napoli povas trankvile morti, tiel oni diras pri Bali', ke kiu iam iris tien, ĉiam sopiras tien reiri. Kaj mi renkontis neniun, kiu ne tre volonte tien reirus. —

Bali' situas oriente de la insulo Javo kaj estas de ĝi apartigita de markolo. Malgraŭ la fakto ke oni el Surabajo povas atingi la nordan havenon de Bali' (Buleleng) per dudekhora marveturado, oni post alveno tie tuj konstatas, ke oni sin trovas en tute alia mondo: la trankvilaj, malhelkoloraj Javanoj estas anstataŭigitaj de brunetaj homoj de meza staturo. Estas belaj afablaj, bonhumoraj homoj, kiuj interrompas ilian kamparlaboron por naive kaj afable rigardi al la preterpasantaj turistoj. La diferenco inter la kultura vivo en Javo kaj tiu en Bali' estas precipe klarigebla per la Balia religiformo.—

Oficiale la Baliano konfesas la Hinduismon (la Javanoj jam dum ĉirkaŭ kvar jarcentoj akceptis la Islamismon), sed praktike oni en Bali' sin okupas je la religio de la praparencoj. Ekzemple: en la domtemploj indiĝenaj dioj kaj ankaŭ la praparencoj estas adorataj. Ĉi-tiu praparenco-servo, miksita kun iom da animismo (ekzemple: la adorado de mont-, arb-, kaj riverspirituloj) formas laŭvere la fundamenton de la Balia religio. Kontraŭe, la kremacio, kiun oni tie aplikas, estas esprimo de la religio, kiun la Brahmanoj iam tie dekretis; sed pri tio mi parolos pli detale aliloke en ĉi-tiu artikolo.

Preskaŭ ĉiuj diversaj temoj de la Balia artformo devenas el la religio: la riĉe ornamitaj templopordegoj, ĉizitaj el mola sabloŝtono, montras ofte figurojn da la serpento kaj la testudo, la bestoj, kiuj estas dediĉitaj al la dio Viŝnu'. Super la pordegoj montriĝas la kapo de Boma', la filo de la Tero. Rama', la bona heroo, kun siaj helpantoj, la simioj, sub ilia reĝo Sugrivo kaj ilia komandanto Anoman', estas ankaŭ ofte trovataj inter la skulptaĵoj. Kiel neevitebla sekvo de l'uzado de mola sabloŝtono kiel konstrumaterialo, ofta riparado de difektiĝintaj muroj estas necesa, sekve de kio la malnova Balia skulptarto estas konservata. La ĉizarto estas herede transdonata de gento al gento. Multaj skulptaĵoj, kiuj al ni ŝajnas tre malnovaj, laŭvere estas faritaj de la nunvivanta gento. Ankaŭ dancoj havas plej ofte religian fundamenton. Dum mia vizitado al Bali', mi havis la bonŝancon ĉeesti la „Ketjak", speco de „ojanger"-danco, kiun la plej multo de la turistoj ne povis trafi.—

Sub palmarboj ĉe vilaĝeto apud Den-Pasar', kunvenis je sunsubiro cento da viroj por doni dancprezentadon, kiu faras neforgeseblan impreson je la rigardanto. La kanto kaj la ritmo de ĉi-tiu danco estas iagrade ĉerpitaj el la religia „Ketjak"-horo de pasinta tempo, horo, kiu devis servi kiel akompano al la „Nadi", (persono, kiu estas en hipnota stato). En la dua parto de la prezentado, la „Ketjak" figuras la armeojn de Sugrivo kaj Subali', la simiofrataro. La „Dalang" (deklamisto) deklamas episodon el la „Ramajano" kaj poste sekvas la figurado de la batalo. —

La sekreto de la sukceso de tiaj prezentadoj kuŝas en la fakto, ke ĉiu Baliano denature estas artisto. De sia juneco li ĉeestas multnombrajn muzik- kaj dancprezentadojn kaj mem partoprenas ilin. Ĉirkaŭita de naturbelaĵoj, kiuj eble povas esti egalitaj sed neniam povas esti superitaj, kaj vivanta inter homoj kun tre klera sento je belo, li ne povas fari alie ol kreski en tiu sama direkto.

Bali' estas kvazaŭ sorbigata en atmosfero de senzorga adorado de la belo: floro, de preterpasinto metita en la orelon de malnova kaj grizkolora statuo apud la vojo: la kanta sono de „gamelan" (indiĝena muzikilaro) en la malproksimo, kie en templo oni oferas florojn kaj fruktojn al la protektantaj spirituloj; kaj multaj aliaĵoj atestas, ke artamo estas fortega karaktertrajto de la Baliano.

Kun sangruĝa, Hibisko kiu ardas sur la blunigreco de sia hararo, li kantante trairas la vivon. Kaj la vizitanto jam post unu aŭ du tagoj estas kaptita en la kaptiloj de la ĉarmo, kiujn ĉi-tiu rava insulo al li metas, tiel ke li de si forskuas siajn okcidentanajn zorgojn kaj komencas kunvivi kun la Indiĝeno en lia pasia konsiderado de la belo.-

La dancprezentadoj, ĉe la „Bali-Hote[illegible] kun akompano de la „gamelon-gong" [illegible] Balaluan; la „legong"- kaj „djanger"-danc[illegible] ĉe Kedaton, kie eĉ dekjaraĝaj geknaboj pr[illegible] zentas altkvalitan artaĵon; la vido al [illegible] vulkano „Batur" el de la vojo, kiu konduk[illegible] al la „pasangrahan" (de la Registaro ara[illegible] ĝita gastejeto en la interna lando) ĉe Ki[illegible] tamani; la „Goa-Gadjah" (Elefantogrot[illegible] apud Bedhulu; kaj aliaj vidindaĵoj verd[illegible] meritas apartan pritrakton kaj ne nur ma[illegible] longan mencion.

Tamen mi ĉi-tie volas iom pli detale pr[illegible] trakti unu el la plej interesaj apartaj[illegible] nome la kremacion, kiu kutime estiĝas [illegible] Bali'.

Ĉi-tiu kremacio estas la plej grava ka[illegible] samtempe la plej multekosta el ĉiuj Bali[illegible] religi-ceremonioj. Kiam ĝi rilatas person[illegible] de alta rango, la elspezoj povas atingi [illegible] sumon de pli ol mil guldenoj kaj en kelka[illegible] kazoj en la pasinta tempo, oni eĉ por ti[illegible] elspezis kvindekmil ĝis centmil guldenoj[illegible] Pro ĉi-tiuj cirkonstancoj estas kompreneb[illegible] ke malriĉuloj kelkfoje devas atendi du[illegible] jaroj antaŭ ol ili povas esti kremaci[illegible] Sed ekzistas ankaŭ aliaj kaŭzoj, kiuj devi[illegible] prokraston de la kremacio: kiam pli ju[illegible] familiano mortas, tiam oni devas prokras[illegible] la kremacion, ĉar alie estus granda sen[illegible] spektaĵo kontraŭ la ankoraŭ vivantaj [illegible] aĝaj familianoj.

En tia kazo la korpo del'mortinto est[illegible] aŭ provizore enterigita aŭ volvita en tu[illegible] konservita en speciale por tiu celo destin[illegible] dometo. Tiam oni ĉiutage pli streĉigas [illegible] bandaĝojn ĉirkaŭ la korpon ĝis tiam kia[illegible] ĉiu fluidaĵo estas tiel el ĝi premita, ke ĝ[illegible] kiam venas la tempo, ke la kremacio pova[illegible] okazi, povas esti mumiforme metita en la[illegible] brulturon.

Post multaj ceremonioj en la funebra domo je la tago de la kremacio („palebon[illegible] oni aranĝas procesion el la domo al la[illegible] kremaciejo. Antaŭiras la „gamelan"-isto[illegible] sekvas standardoj, pikiloj, lancoj kaj po[illegible] longa sekvantaro da virinoj, kiuj portas oferaĵojn. Ĉi-tiuj oferaĵoj konsistas el frukto[illegible] kaj kukaĵoj, ornamitaj per floroj. Post ĉi-ti[illegible] oferaĵoj estas portataj la ornamaĵoj kaj la[illegible] uzobjektoj de la mortinto (oraj „sirih"-ska[illegible] toloj, ringoj, roboj ktp) kaj fine sekvas la[illegible] funebra procesio kun turo, en kiun estas metata la korpo de l' mortinto („vadah"), ki[illegible] kelkfoje kiam la mortinto estas de tre malnova nobeleco, estas tre alta. Ĉi-tiu tur[illegible] ĉiam estas kronita per la kapo de „Boma"[illegible] la filo de la Tero. La ĉerko, kiu estas metita en ĝian mezparton, povas havi diversajn formojn. Por la altranga nobelaro ĝi estas farata laŭ la formo de bovo; por la ordinara popolo ĝi estas laŭ la formo de mita fiŝ-elefanto („gadjahmina"). Alvenante ĉe la kremaciterenο oni portas la turon kun la korpo del' mortinto trifoje ĉirkaŭ la krema-

ciejo. Poste oni per bambu-ŝtupetaro deprenas la korpon el la turo kaj metas ĝin sur la brulturon. Post benado de la multnombraj oferaĵoj kaj aspergado de la ĉerko per „toja-pangentas„ (saviga akvo), la ĉerko kune kun la procesituro estas forbrulata. Je la sekvanta tago la cindro estas kolektita kaj benata de la pastroj. Poste la cindro kune kun animpurigantaj oferaĵoj sur tronoj de blankaĵoj kaj orkoloraĵoj, oni portas al la maro aŭ al apuda rivero por tie esti dissŝutata.

Kremacio en Bali estas sekvo de la kredo al reenkarniĝo. La Baliano kredas, ke la animo post la kremacio nebulforme revenas al la tero por tiam alpreni pli aŭ malpli altan formon, konforme al siaj kondutoj en sia antaŭa ekzistado. La Baliano konsideras sin plej feliĉa, kiam li je reenkarniĝo povas reiri al sia amata insulo, ĉar ankaŭ li estas certe konvinkita, ke lia amata insulo estas la plej alloga loko sur la tero.

Alia soleno, kiun oni nepre ne preterlasu, estas edziĝofesto en Sud-Bali. Kiam la geedziĝantoj estas de nobela deveno, la edziniĝanto, vestata per orumegita brila vestaĵo, kun oraj ornamaĵoj en la hararo kaj kun oraj ĉirkaŭbrakoj sur si, estas portata per orumita palankeno al la domo de siaj estontaj boparencoj. Ankaŭ la dentofajlado estas soleno akompanata de festenoj. Tiurilate mi vidis la preparadon de „sate“ (malgrandaj pecoj de viando pikitaj sur bambubastonetoj kaj tiel rostitaj) je pli granda skalo ol iam aliloke en la mondo. Dudeko da viroj sidis vice apud fendita bambutrunko, kiu kuŝis sur la tero, por kontroli centojn da bastonetoj kun viando, kiuj kun la pintoj metitaj en la fendo de l' bambutrunko kaj la aliaj ekstremaĵoj sur arde brulanta karbo, servas kiel „patjak“ (rostpikiletoj).

Ĉu reale ekzistas io kia Orienta Sorĉarto? La kredo je sorĉiloj („guna-guna“) en Bali ankoraŭ estas kutima kaj okazas tie certe strangaj aferoj. Mi vidis la „Barong“-dancon, dum kiu aro da hipnotigitaj knaboj ĉe klara taglumo, faris nekredeblaĵojn per la „kris“ (speco de ponardo). Oni rakontas strangajn aferojn pri homoj, kiuj posedas karakterize supernaturajn povojn. Eble ili posedas sciencon, kiun ni ne ankoraŭ atingis kaj ĉi-ĉio estas kazo de „omne ignotum pro miraculo“. Estas eble kaj eĉ verŝajne, ke la Orientanoj kun siaj filozofiaj privataj ideoj, levis la okultismon ĝis la regiono de scienco, kies leĝojn ni ne ankoraŭ konas.

C. A. A. Haccou, Batoe (Malang), Nederl. Hindujo.

Vizitu **regule** la kunvenojn de viaj grupoj kaj ankaŭ tiujn de la aliaj kluboj kaj grupoj!

Ĉiam portu la E-steleton!

Ĉiu el vi povas esti bela.

Ĉu oni devas resti senreziste kontenta pri la aspekto, kiun al ni donis patrino naturo, eĉ kiam ĝi ne estas favora? Jes kaj . . . ne. Oni ne povas plilongigi malgrandan figuron, oni ne povas ovaligi rondan vizaĝon. Sed oni povas korekti kaj malfortigi malbelaĵojn kaj — oni povas akcenti kio estas bela de naturo. Por tio oni kritike observu antaŭ spegulo siajn figuron, haŭton, trajtojn kaj poste agu konvene.

Konvene agi estas, ke oni ekzemple flegu sian haŭton laŭ ĝia speciala postulo, observante ĉu ĝi estas seka aŭ sebomalriĉa, ĉar de tio dependas la flegadmaniero. Laŭ la koloro de sia vizaĝo elektu la nuancon de la pudro. Provu antaŭ la spegulo diversajn hararanĝojn, frizaĵo eksterordinare povas plibeligi vizaĝon, se la haro mem estas bone flegita.

Sperta kuracisto por kosmetiko diras: La kaŭzoj de tro seka kaj sebolmalriĉa haŭto en la vizaĝo kaj sur la manoj estas diversaj. Krom denaskiĝa posedo la kaŭzo povas esti la *influo de vento kaj malvarmo, longdaŭra efiko de grasforigaj rimedoj (kuracistoj, lavistinoj)* kaj ankaŭ troa puremo, tro ofta lavado speciale dum vintro kaj per ne seboenhavavaj sapoj. Tial oni evitu la oftan uzadon de akvo, por restigi la elastecon de la haŭto, kaj ĉe ŝiriĝinta, krevita haŭto oni entute ne lavu sin dum kelka tempo. Sola kuracado: ofta grasumado, uzo de nehaŭtincita kremo.

Troseba haŭto aspektas olea, sebebrila, ofte ankaŭ skvame La kaŭzo estas troa funkciado de la seboglandoj, kiu malsano estas ofta, ĝenerale sendanĝera, sed obstina kaj kosmetike ne maldanĝera. Ofte ĝi ja estas la kaŭzo de harperdo, kiam ĝi infektis la harumitan kapohaŭton.

Ankaŭ la estiĝo de aknoj kaj la tiom danĝera pligrandiĝo de la poroj estas sekvoj de ĉi tiu malsano kun la scienca nomo „Seborrhöe“ (sebfluado). Kuracado: Movado en libera aero, evito de digestmalhelpoj kaj kronika mallakso. Ne manĝu tro grasajn kaj spicitajn manĝaĵojn. Grava estas la ĉiutaga zorgega kaj ĝisfunda haŭtflegado. Ne ĉiam estas laŭcele, tute ne tuŝi la vizaĝhaŭton per sapo kaj akvo; ĝuste en la komenco ofte alternaj lavadoj per varmega kaj malvarma akvo necesas.

Ankaŭ la radiumado per ultraviolaj radioj estas tre ŝatata kaj kelkfoje ankaŭ tre efika rimedo en la batalo kontraŭ la „seboreo“. La unuopaj dozoj ne estu tro mallongaj. La kapharoj plej bone reagas al tio. Sed oni devas esti tre singarda pri radiumado per „Röntgen“-radioj.

Ok gravaj reguloj:

Malĝuste: Vespere enlitiĝi sen zorga purigado de la vizaĝo de pudro, ŝminko kaj kremo. Farinte tion ne miru pri akna kaj nepura haŭto.

Ĝuste: Kiom ajn laca oni estas, oni forigu zorge per puriga kremo la tutan ŝminktavolon. Ĉu oni surfrotas poste sebokremon aŭ ne estas afero de gusto. Ĉiukaze oni faru tion, se oni havas tre sekan haŭton.
Malĝuste: Pruntedoni al iu alia sian aŭ eĉ uzi la publike en tualetejoj proponatajn pudrokvastojn. Per tiu ofte okazas infektoj.
Ĝuste: Pudrokvastojn oni anstataŭigu kiel eble plej ofte. Pli bone oni ĉiufoje uzu novan aŭ vaton.
Malĝuste: Tro ruĝigi la vangojn, kio maljunigas.
Ĝuste: Sur la vangon, eble sur la vangooston, faru en triangulo tri malgrandajn punktojn, kiujn oni egale distribuas eksteren per la fingroj.
Malĝuste: Razi la brovojn.
Ĝuste: Brovharoj devas esti elŝiratai per speciale formitaj pinĉiletoj. Post la elŝiro oni surmetu tuj alkoholon kaj pudru la lokon. (Laŭ Heroldo mallongigite.)

Radio-programo de stacioj Warszawa kaj Kraków.

Estis jam paroladoj la 9., 16., 25. kaj 30. X., 7. kaj 8. XI.

21. XI., 21 h 30 prof. d-ro Raiski „Plantokulturado en Pollando“; 22. XI., 22 h 45 prof. d-ro Odo Bujwid „Zamenhof kaj lia verko“; 29. XI., 22 h 45 prof. Bilinski „Pola toleremo kaj pacamo“; 11. XII., 22 h 45 Tad. Hodakowski „Esp. radia leterkesto“; 12. XII., 21 h 30 drof. d-ro Reiss „Mazurkoj de Chopin“.

Ĉu vi volas esti feliĉa en la edzeco? Se jes, tuj mendu „Edzeca vivo“, libreto por personoj nur pli aĝaj ol 16 jaroj. Prezo 2 resp. kup. afrankite. Stjepan Miŝak Esp.-eldonejo, Adana, Turkujo.

Oesterreichischer Reisemarkenverkehr. La aŭstriaj Federaciaj Fervojoj enkondukis, komencante jam de 1. okt., novaranĝon, por ebligi al ĉiu almenaŭ unufojan veturadon. Oni aĉetas por 50 groŝoj kolektfolion por vojaĝmarkoj (aĉeteblaj po 50 gr ĉe ĉiu biletvendejo de Bundesbahnen (BB), vojaĝoficejoj kaj poŝtgiĉetoj. 20 markoj entute sur unu folio donas S 10.—, do oni ŝparis tiun sumon, aĉetinte po 50 gr. kaj povas eluzi la ŝparitan monon dum la feriovojaĝo aŭ iam ajn kaj la folio valoros laŭ la pasinta tempo 6—10 % pli ol enpagite. Do per ŝparo havigi al si belan somervojaĝon!

„Oesterreichische Pädagogische Warte“ (Aŭstria Pedagogia Gardejo) publikigas en sia n-ro 10, 29. jarkolekto de 15. oktobro preskaŭ dupaĝan artikolon de nia estrarano Reg.-Rat Stengel pri „Esperanto en la lernejo“, kiu taŭgas konvinki ankaŭ la dubemulojn inter la instruistaro. La devizo estas bone kaj trafe elektita: **„Kiu ne scipovas fremdajn lingvojn, nenion scias pri sia propra“ (Goethe).**

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien I Neue Burg, Heldenplatz

Propaganda kaj organiza fakoj.

Intern ni, samideanoj . . nia afero ne marŝas, kiel ĝi devus! Kiu kulpas? La krizo? Eble, parte? Sed ni esploru nian konsciencon, ĉu ni ĉiam prave kaj ĝuste agis en nia propagando! Ni konfesu: ne! Kiel oni laboris? En lokoj kun pli aŭ malpli fervoraj esp.-istoj kaj pli malpli taŭga instruemulo okazis unu-monata propagando per flugfolioj, afiŝoj, gazetanoncoj aŭ persona varbado kun la efiko, ke malgranda aro da interesuloj sin anoncis al kurso. Ofte ankaŭ ne taŭga instruanto estis je dispono. Poste la s-anoj fingvidis la kurson, kunvenis eventuale en siaj kunvenejoj kaj . . . la publiko nenion aŭdis dum la pluaj dekunu monatoj pri Esp.!

Ni demandas: „Kiel sukcesus fabrikanto, kiu ĉiujare nur unu monaton faras reklamon kaj dekunu monatojn silentas?“ Li bankrotus! Sekve . . .

Ni nun esploru niajn eluzotajn eblecojn! La publiko estas aŭ malamika aŭ indiferenta rilate E-on kaj ambaŭ kategoriojn ni devas interesigi al E. Simpla unumonata varbado per afiŝoj ktp. ne sufiĉas; la propagando daŭru la tutan jaron, tiam ĝi estos efika!

Kiu nun propagandu? Unuavice la grupoj kaj la izoluloj varbu la tutan jaron per notetoj en siaj lokaj gazetoj, per buŝa informado, afiŝoj, paroladoj, aranĝoj ktp. speciale ĉe administraroj, lernejoj, korporacioj; AEA ilin subtenos ĉiamaniere laŭ ilia peto kaj krome havas sian specialan laboron en la oficialaj rondoj de la ŝtato kaj Federaciaj Landoj!

Ni starigu dujarplanon ĝis julio 1936, la Universala Kongreso en Aŭstrio! Ĝis tiam ni devas havi almenaŭ 3000 organizitajn esperantistojn en Aŭstrio! Ĉiu unuopa rigardu kiel sian plej altan taskon esti en la unua vico de ĉi tiu agado!

Kiamaniere atingi ĉi tiun ciferon, kiu ne estas utopia? La grupoj tuj ekagu en sia varbado kaj klerigado de la publiko kaj tuj sendu al AEA siajn ideojn, sugestojn, proponojn pri farota propagando! AEA kolektos tiujn ideojn, tuj priparolos ilin kaj poste sendos al la diversaj grupoj kaj delegitoj en la aliaj lokoj precizan planon pri la varbeblecoj por laŭcela laboro.

Por finance ebligi bonan laboron necesas, ke la grupoj kaj izoluloj, do ĉiuj aŭstriaj esperantistoj, estu membroj de la landa organizo AEA kaj per tio simplaj membroj de UEA almenaŭ ekde januaro 1935! Ili pagu por 1935 po persono entute S 2.—, familianoj kaj senlaboruloj S 1.— kaj per tio havos ankaŭ avantaĝojn monajn ĉe 28. Universala Kongreso de Esperanto 1936 en Aŭstrio!

Neniu restos ekster niaj pagantaj membroj! Vi ja ne pagas tiun malgrandan sumon por alia, nur por vi mem, nur por via, nia amata Esperanto, por ke Esperanto disvastiĝu en Aŭstrio tiom, por ke Aŭstrio fariĝu ekzemplondona por la aliaj landoj!

Sed ne sufiĉas tiu kotizo!

Pro tio „Helpkomitato" celis kolekti oferemajn samideanojn, kiuj same opinias, ke jam valoras monofero por pli rapide antaŭenpuŝi nian aŭstrian E-movadon. Pro disciplinaj kaŭzoj „Helpkomitato" fariĝis „Propaganda Fako" de AEA kaj tiu havas la taskon:

1. presigi novajn flugfoliojn, afiŝojn ktp., disponeblajn ege malmultekoste al la propagandantaj grupoj kaj izoluloj,

2. presigi eventuale novan „Ŝlosilo"-n je la prezo de 10 gr.,

3. aranĝi kursojn en lokoj, kie ne ekzistas esp.-istoj aŭ instruantoj pere de enlandaj, senlaboraj, kapablaj esperantistoj. En ĉiu urbo kaj iom pli granda loko ni havu samideanojn estonte!

4. disvastigi nian oficialan organon kun ĝia nova 4-paĝa parto germanlingva („Die zweite Sprache für Alle"), por ke tiu povos per disvastigo en la tuta lando servi al nia movado kaj laŭ la nombro de la abonantoj malaltigi la prezon aŭ ĝin almenaŭ doni al la senlaboruloj pli malmultekoste.

Varbu jam nun inter viaj konatuloj abonantojn por „Zweite Sprache", retenu la monon: dum januaro pro aliaj elspezoj neniu havas superfluan monon. En viaj kursoj ĉiu kursano estu abonanto: tio konservigas lian intereson por Esperanto.

Ni nun invitas ĉiujn aŭstriajn samideanojn, fariĝi apartaj membroj de tiu „Propaganda Fako de AEA", por tiamaniere ebligi, ke plej baldaŭe aperu la unuaj propagandiloj.

La membroj nur por unu jaro (nov. 1934—nov. 1935) pagu po monato S 3.—, do entute S 36.—, aŭ kune, aŭ monate. Krome povas subteni ĉiu unuopa samideano aŭ grupo, rondo ktp. eĉ per la plej malgranda sumeto. Ĉiu helpu laŭ sia volo kaj povo, ĉiu donaco por nia movado estas danke akceptota! La nomoj de la membroj estos publikigataj, same la unuopaj donacoj. Agadu kaj kasoraporto ĉiumonate! Havu fidon!

1. Membrolisto: Ĝeneraldirektoro d-ro Brunauer, advokato d-ro Engländer, oficistino Lya Rusmayr, registara konsilisto Steiner, reg. kons. Stengel, sekcia ĉefo d-ro Uebelhör, oficisto Ulbrich.

Aliĝojn kaj donacojn al AEA (propra konto).

Neniu postrestu! Ni venkos, se vi, se ni kune volas!

Nia unua **agadplano:**

La grupoj, delegitoj kaj izoluloj bonvolu kun ĉiuj fortoj labori laŭ tiu plano!

1. en ĉiuj lokaj gazetoj, ankaŭ fakĵurnaloj aperigu noteton (se eble kelkfoje) kun proksimume jena enhavo: „Esperanto-Veranstaltungen in Oesterreich 1935 und 1936. Im Jahre 1935 finden in den Städten Klagenfurt und Innsbruck für die zum 27. Esperanto-Weltkongresse nach Rom reisenden Esperantisten aus aller Welt Vorkongresse statt. Im Jahre 1936 ist der 28. Esperanto-Weltkongreß in Wien mit Vorveranstaltungen in Salzburg, Linz und Nachveranstaltungen in Graz, Villach. Reisen durch Oesterreich werden hiebei veranstaltet, auch nach dem Burgenlande. Um alle diese Veranstaltungen würdig gestalten zu können und auch dem Fremdenverkehre in unserem Lande dienen zu können, benötigen wir eine genaue Statistik der in Oesterreich lebenden Esperantisten und Esperantofreunde. Wir bitten diese, sich mit einfacher Karte unter Angabe ihrer genauen Anschrift nebst Beruf beim Oesterreichischen Esperanto-Bund, Wien I. Neue Burg anzumelden. Frankierung 3 gr., wenn keine weitere Nachricht gegeben wird." Por Wien ĉi tiun taskon transprenos „Viena Unio" en kontakto kun AEA.

2. ĉiu sendu al ni la adresojn, al li konatajn, de esperantistoj en sia regiono, por ke ni povu fari precizan kaj kompletan nomaron de la aŭstriaj esperantistoj, por kiu la laboroj jam komenciĝis.

3. propagandu, por ke vi povu jam nun aranĝi eĉ malgrandajn kursojn. Bonaj afiŝoj haveblaj ĉe AEA. Prezo po ekz. 6 gr. plus afranko. Ankoraŭ estas tempo!

4. raportu al la urbestroj, Komercaj Ĉambroj, korporacioj, lernejestroj, lokaj lernejkonsilantaroj ktp. pri la dum Pentekosto okazinta Internacia Konferenco „Esperanto en la lernejon kaj praktikon" kaj pri la okazontaj E-aranĝoj internaciaj. Certe tuj post Novjaro en la tuta mondo komenciĝos samtempa laŭcela agado laŭ plano nun ellaborata de nia prezidanto kiel membro de la Estraro de UEA. Tiun planon UEA dissendos, kompletigita al ĉiuj Landaj Organizoj en la tuta mondo por samtempa konkero de la mondo.

5. sendu al ni ĉiumonate raporton pri via agado dum la pasinta monato ne pli malfrue ol ĝis la 5. de l' monato. Kelkaj grupoj tiasence jam de longa tempo agas. Ni publikigos la esencajn partojn en nia AE.

6. atentigu pere de viaj lokaj ĵurnaloj la legantaron pri la „Radio-paroladoj" kaj informu pri ili la sub 4 menciitajn instancojn.

7. sendu al ni proponojn, sugestojn. Ni volonte ilin detale pritraktos kaj eluzos ilin!

8. fondu grupon en via loko, ankaŭ, se vi nur estas 5 membroj. Ni anoncos la fondon de via loka grupo senpere ĉe Sicherheitsdirektor de via lando. Tio pli rapidas la aferon kaj ŝparos al vi la laboron kaj la kompiladon de la statutoj. La koncernan statutekzempleron vi poste ricevos de la ŝtata estraro kune kun la permeso pri fondo de la grupo.

9. postulu nian helpon, kiam ajn vi nin bezonas! Ni estas ĉiam je via dispono.

Kunlaboru! Personaj ambicioj ne ekzistu! Persona malamikeco ne havu lokon en la esperantistaro aŭstria! Ni taksu ĉiun samideanon laŭ lia laboro kaj rekonu lian valoron por nia movado! La politika mondpercepto de la unuopa ne interesu nin!

Ni nur laboru en Zamenhofa sento, kaj — ni venkos!

AEA: Steiner, Dr. Engländer.
Org. Fako: Stengel, Fiedler.
Prop. Fako: Ulbrich.

„Die zweite Sprache für Alle".

La siatempe mallonge aperinta „Weltsprache" kaj „Die Sprache für Alle" estis bonaj propagandiloj kaj kun bedaŭro multaj vidis ĝin malaperi.

Laŭ sugesto de diversaj flankoj la eldonanto de AE aperigos ekde januaro 1935 kvarpaĝan varbgazeton sub la nomo „Die zweite Sprache für Alle" kiel aldono al „Aŭstria Esperantisto". La redaktadon de tiu germana gazetparto transprenis sub nia ĉefredaktado s-ano Ulbrich, Pettenbach, O. Oe.

AE do de januaro havos 8 paĝojn nur E-tekston kaj 4 paĝojn germanan tekston (aldono) kaj kostos por 1935 S 4.60, pagebla ankaŭ en 4 part-antaŭpagoj po S 1.25 (pro la kostoj de ĉeko ktp.). La grupoj povos pagi la gazeton por siaj membroj kune po S 1.15.

Por senlaboruloj la 12-paĝa AE (kun aldono) kostos pojare nur S 4.—, pagebla en 4 partoj antaŭe pere de siaj grupoj.

La germana teksto enhavos 1 paĝon kun mallongaj interesaj informoj (uzeblaj por la loka gazetaro), kelkajn artikolojn pri E en rilato kun lernejo, trafiko, sciencoj ktp., raporton pri la aranĝoj por 27. Univ. Kongreso en Romo kaj Antaŭkongresoj en Aŭstrio (poste pri 28. Univ. Kongreso) kaj mal ongan interesan rakonton en Esperanto kun germana traduko, por ke la neesperantistoj havu okazon frandi iomete de Esperanto.

„Die zweite Sprache für Alle" estas aparte ricevebla afrankite por S 1.— nur por neesperantistoj (en poŝtmarkoj) 11 fojojn jare kaj en ĉiu loko ĝi estu ĉe la urbestro, lernejkonsilantaro, en gastejoj, kafejoj, fervojrestoracioj ktp. kiel bona propagandilo por la E-movado en via propra loko. Nia „Propaganda Fako" klopodos disvastigi ĝin kaj ĉiu helpu en sia propra intereso.

Germana E-Ligo en Ĉeĥoslovaka Respubliko informis nin, ke ĝi klopodos, disvastigi tiun propagandilon en siaj rondoj.

Ni nun interrilatiĝos kun Germana E-Asocio pro la sama celo.

Kunhelpu pliriĉigi AE kun „2. Sprache" laŭenhave, sendu artikolojn, raportojn, instigojn ktp. kaj varbu abonantojn, por havigi al ni aŭ 16-paĝan gazeton je la sama prezo aŭ 12-paĝan je malaltigata prezo.

La tuta afero estis ankaŭ priparolata en AEA-kunsido. La redakcio de AE

La referanto por »Propaganda Fako« R. Ulbrich loĝas nun Pettenbach, O.-Ö.

Kompletigo.

En la listo de la estraro estis ellasata: D-ro Emil Pfeffer, kiu transprenis la taskon de la gazetservo.

Mi petas pardonon pro tio. Estas mia kulpo! Steiner

Graz. Okazis la 9. XI. ĉefkunveno de E-Soc. por Stirio kaj poste de la E-grupo Graz de E-Soc. p. St. — Bone vizitata kunveno, kiu esperigas al nova florado de la laboro de niaj senlacaj stiriaj samideanoj. La estraro estis reelektata. Raporto en n-ro 12. Ĉeestis prez. Steiner de AEA.

E- Klub. Ĉiu ĉeestu nian lumbildvesperon la 22. de novembro. Kunvenigu gastojn!

Wien. E-soc. »Danubio«. 19. XI. Lumbildparolado »Stockholm kaj Svedlando« de Olga Klotz. 26. XI. Parolata E-gazeto: Prez. Cech, F. Vasfa, d-ro Mildwurf, A. Klein, d-ro Pfeffer, W. Mudrak. — Ĉiun lundon de la 19—20 h konversacia horo, gastoj bonvenantaj!

Wien. Zamenhof-grupo ŝanĝis sian klubejon kaj kunvenas ĉiujaŭde post la 19 h en la ĉefiernejo XIV. Felberstr. 44, angulo Schweglerstr. 2. Eniro maldekstre de la pordego. Atingebla per tramlinioj 9, 49, M. Ĉiuj kore invitataj!

Vizito de „Ravag-ekspozicio".

E-grupo »Danubio« invitas al komuna vizito la 25. de nov. Renkontejo: ĉefenirejo 9 h atm. Messeplatz. Rabatita pago 30 g. Kunvenigu viajn familianojn kaj amikojn. Oficiala gvidado tra la ekspozicio.

Ludwig Klausberger, ekspopolistruisto en Wien mortis en sia 73. vivjaro. Ni perdas en li veran fraton, ĉiam helpeman samideanon kaj afablan homon. Al la familio kortuŝan kondolencon. AEA, AE

Kursgvidantoj!

Estas intencate, instali ankoraŭ dum tiu ĉi vintro kursojn en diversaj lokoj de Aŭstrio. Senlaboraj s-anoj, kapablaj gvidi kursojn, sin anoncu al AEA!

Voitsberg-Köflacher Wochenblatt bone raportis pri Stockholm (Schulrat Schöpfer).

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.